

APR 1918

PRINCETON, N. J.

Amerika Esperantisto

DECEMBER, 1917



Official Organ of
The Esperanto Association of North America

AMERIKA ESPERANTISTO

Official Organ

of

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the
International Auxiliary Language, Esperanto.

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Rondo, meets Friday eve., Rm. 305 Lick Bldg., 35 Montgomery St., F-ino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Ave.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo,—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Wednesday evenings. Address H. S. Lane, Sec'y, 1323 Oxford St.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Sec. & Treas., 436 15th St.

BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 8 P. M. R. Goodland, Sec.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P. M.

BUTTE, MONT.

Argentarka Esp. Rondo, kunvenas vendrede, 8.00 P. M. C. L. Williams, Sek., 311 E. Mercury St.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslov Sohehrad, Secy, 1116 W. 19th Place. La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

ROCKFORD, ILLS.

Skandinava Esperanto-Instituto, 417 7th St. Joseph Johnson, Sec'y, 2315 Parmelee St.

CINCINNATI, OHIO.

Cincinnati Esperanto Soc., 629 Vine Street. Miss Florence Becker, Sec., 332 Third Ave., Dayton, Ky.

DELPHOS, OHIO.

Delphos Esperanto Klubo, Carnegie Library; Meets every Tuesday. 7.30 P. M., A. J. Laudick, Sec'y.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3547 W. 44th St.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg., Mrs. Wm. C. Tapley, Sec'y, 13 East Promenade.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists, S-ino B. H. Kerner, Sek., 632 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P.M.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody, daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P. M.

La Pola Esp. Unuigo, ĉiusemajne, Magnus Butzel Library, Harper & E. Grand Blvd. La Septentrio, Tues., 8.00 P. M., 578 Alexandrine Ave., W.

HOUSTON, TEXAS.

Houston Esperanto Rondo, ĉiun mardon, 8.00 P. M., ĉe Y. M. C. A. S-ro A. F. Sundermeyer, Sek.

NEW YORK CITY, N. Y.

The Greater New York Esperanto Society, including all chartered clubs in Manhattan, The Bronx, Brooklyn, Queens, Richmond, Long Island, Westchester County and the New Jersey suburbs, C. C. Coigne, Secretary, 2633 Creston Avenue. Esperantists visiting New York should call Fordham 2749.

Germana Esperanto-Societo — activities suspended during the war.

PHILADELPHIA, PA.

Phila Esp. Soc., J. F. Knowlan, Sec., 45 No. 13th St. Meets 4th Fri., Windsor Cafe, 1217 Filbert St. Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art Wm. Smith, Sec., 7315 Greenwood St. Fridays, 8 P.M., Teachers' Rm., Carnegie Inst.

PLAINVIEW, NEBR.

Esperanto-Fako de la "Sola Skolto" (Lone Scout), 500 N. Dearborn, Chicago, Ill. (Revuo por la Junularo. Organizu grupojn inter la geknaboj. Granda sukceso. Abonu tuj! Jare .75; Kvarmonate .25.) Fakestro, Chas. P. Lang, Plainview, Nebr.

HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y, Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)
WEST NEWTON, MASS.

One Dollar a Year.

Single Copy Ten Cents.

Mallongaj verkoj, tradukaj kaj novaĵoj ĉiam prefere akceptitaj. **Oni ne resendas** neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone.

Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

VOL. 21

DECEMBER, 1917

NO. 5

IT'S JULY 18, 19, 20 AND 21 AT GREEN ACRE

By unanimous vote of the Executive Committee the above dates were fixed for the Eleventh Annual Congress of the Esperanto Association of North America. Workers in the local groups are earnestly requested to call the attention of their colleagues to this fact and to thus insure a large attendance at the "Dekunua."

Henry W. Hetzel, Chrmn.

NEW HEAD OF EXAMINATIONS COMMITTEE

The Executive Committee has recently appointed Mr. Benjamin W. Reich, lately of New York, to be the Chairman of the important Committee on Examinations. All candidates for either the Beginners' or Advanced Degrees should communicate with Mr. Reich. His present address is 214 West Ballard St., Ada, Ohio.

WILL THERE BE DIALECTS OF ESPERANTO?

Occasionally we meet a person who thinks that "all steps toward a universal language are futile" for the reason that, as he says, even assuming that we could ever get the people of the

world to speak one tongue, in the course of years differences in pronunciation, localisms and even changes in the grammar would arise to make the future linguistic aspect of the world after all very much as it is today with all the complexities and variations that we now find.

Esperantists, of course, know that such an opinion is founded upon two unwarranted assumptions. As to the first, no one is really proposing a "universal" tongue. Esperantists, at least, are not guilty of any such stupidity. Their proposition of an **international** language is not only a more modest one and therefore more easily realizable but it takes into account the vast accumulations of culture material that have grown up in the existing national languages and the preservation of which really postulates their preservation as national tongues, at least as far as we of the present generation are concerned.

As its name implies the International Language would only be used between people of **different** nations. While leaving each group of people free not merely to make use of their own national speech but also to develop their own civilization along lines which are just as peculiar,—and, I may even say, just as sacred,—to

them as their language and religion. Esperanto offers a vehicle of communication at once simple and logical, absolutely neutral in its relation to the nations of the world. Even after the most sanguine Esperantist has had his way you and I will still be using English among ourselves and in all likelihood giving very little encouragement to any scheme to abolish our mother tongue.

The second of these erroneous ideas is founded upon a wrong notion of why today differences in speech exist at all. The big reason why the Chinaman and the Frenchman, for instance, have different languages, as well as the more obvious reason for the difference between the speech of the Yorkshireman and that of the Londoner is not hard to understand. Not only had primitive peoples separated before the development of means which give permanence to language, but they then found themselves cut off by seas and mountains from easy means of communication with their cousins of other lands. The latter of these two causes has certainly been the more potent, for, if we assume howsoever great a dispersion of peoples with as great a dispersion of tongues as we please, still, assuming quick railroad and steamship service between the several parts, with thorough systems of telegraphy the world over and with books and newspapers freely crossing the boundaries thru the mediumship of efficient postal systems,—given these, we say, and the most pronounced differences of speech would tend to extinguish themselves. Indeed, this very process is now being worked out right under our eyes. Slowly, it is true, but nevertheless with a certainty which leaves no student room for doubt. Even the casual observer has seen and commented upon the changes which recent events of world importance have made in our own mother tongue;—changes which point to a sure-enough "melting pot of languages," real tho by many undreamed of, right under our very eyes—or rather, about our ears.

To some extent this melting pot has always existed, but the selection of language elements has gone on always more or less **unconsciously** by what, if we may change the figure of

speech, is a kind of eugenics of language. Now while evolution in other things as art, music, science and invention is very manifestly a **conscious** process, why, ask the Esperantists, should language, which is but another human tool for other human needs, be subjected in its growth to the whims and unreasoned changes and distortions which come with time? And why wait for centuries to effect a gradual change toward uniformity of world speech, meanwhile painfully trudging and struggling along handicapped by the diversities, illogicalities and super-necessities of the so-called "natural tongues"?

The uniformity of the accent and pronunciation of Esperanto by the peoples of various nations has long been a commonplace observation among those who have attended the International Congresses. So marked is this uniformity that the nationality of a speaker is absolutely disguised by his neutral speech, unless revealed by the cut of his clothes or other un-linguistic evidence. No, Esperanto will never be in any danger of splitting up into dialects. Rather the contrary will be the result. As the language will be used only internationally localisms will have no chance to develop. Individual nations, it is true, will enrich the common speech with contributions of their best thought, but these will tend to diffuse themselves thruout all the civilized world.

LA TERURA EKKRIO

Mi ofte aŭdas, kiam mi finas argumenton por Esperanto, "Ho jes! La ideo estas bona kaj Esperanto estus alpreninda afero se ĉiu persono ĝin alprenus."

Tio ĉi min ridetigas kaj mi ĉiam rememoras fabelon kiun mi ie aŭdis,—aŭ eble mi nur ĝin elpensis;—ne estas grave. Jen ĝi:

Antaŭ multaj, multaj centjaroj, dum tempo nun tute forgesita estis la insulo Toruno en la mezo de la Suda Maro. Ne demandu al mi kie precize estas aŭ estis tiu nun nekonata insulo. Eble ĝi jam delonge malaperis en la

maron, aŭ eĉ eble ĝi neniam ekzistis; — ne trodemandu. Tamen, iam dum unu el la plej prosperaj periodoj en la historio de Torino regis la saĝa Reĝo Hurafo. Mi diras "saĝa" ĉar neniu en la tuta insula reĝlando havis tiom da scio pri la profundajoj de la artoj, sciencoj, literaturoj kaj lingvoj ol la Reĝo mem. Ne nur li mem estis tre instruita sed lia plej arda pasio estis instigi la saman klerecon al aliaj. Do, ne estu surprizita kiam mi diras ke la ĉefaj elspezoj de la reĝa trezorejo estis por lernejoj, biblio e'oj kaj sciencaj eksperimentadoj. Precipe, la studo de astronomio lin allogis, kaj nature per observatorioj kaj teleskopoj li kaj liaj fidelaj regatoj multe okupigis.

Unu tagon kiam la Reĝo Hurafo estis en la Reĝa Biblioteko leganta volumon pri la luno subte al lia cerbo ekvenis la ideo, "Kvankam la luno estas distance multaj miloj da mejloj, — tromalproksima por ia facila interparolo inter la loĝantoj de nia najbara planedeto kaj ni mondanoj, eble se ni farus sufiĉe grandan bruon tie ĉi la lunanoj, ĝin aŭdante almenaŭ scius ke la mondo nia ne estas senhoma." Tre bonega ekpenso! La sekvanta tago, laŭ la ordono de la Reĝo, kuroj kaj heroldoj trakuris la landon proklamante ke ĉiu regato nepre kunvenu en la mezo de la insulo por kunagi en la kriego kiu certe atingos la malproksiman lunon. Tie, sur la Heruga Platao je la tago elektita staris la tuta loĝantaro de la reĝlando, ĉiu persono preta por fari la teruran ekkrion. En la centro de la atendanta popolamaso staris la Ĉefministro kaj kiam li per suprenlevita ofiĉbas-toneto donis la signalon por fari la laŭtegan bruon — kio okazis? Ĉu ŝajna tertremo frapis la insulon? Aŭ ĉu la oreloj de la ĉeestantoj estis fenditaj pro la terura ekkrio? Ne, ĉar mi estas veramulo mi devas diri al vi nur la bedaŭrindan fakton. Neniam bruoj okazis: ne eĉ unu murmuron oni aŭdis. Ĉiu persono nur silente atentis la bruegon kiun li atendis la aliaj estis farontaj.

Ho ve! Tiel multe da homoj en tiu ĉi plibonigebla mondo estas pretaj por kunlabori nur post kiam ĉiu el la aliaj faros la komencon!

H. W. H.

TRA USONO

Annapolis, Md. Unu el la plej v'glaj ĉiutagajurnaloj de ĉi tiu ĉefurbo de Maryland, la "Advertiser," antaŭ ne-longe ara ĝis kun nia samideano, Pastro James L. Smiley, doni l'urson de lecionoj en la Internacia Lingvo. La unua leciono aperis la 2an de Marto. Krom tio la ĵurnalo publikigis tre favora redaktor-artikolon pri la lingvo kaj ankaŭ kelktage antaŭe ĝi enhavis kontentigan elĉerpaon de la Archdeacon-a letero, sendita al la lastsomer Philadelphia Kongreso de la E. A. N. A.

Philadelphia, Pa. Dum la lastaj kelkaj monatoj la ĉefa aktiva o de la loka societo estis la laboro inter la Knab- kaj Knabin-Skoltoj. La energia Propaganda Komitato, kies gestroj estas S-ro L. S. Ware kaj S-ino Pearl J. Par'er sukcesis instigi la skoltestrojn alpreni Esperanton k'el necesan perilon por skolta tutmondeco. Je la unua sabato en Januaro kaj en Februaro oni havis festojn por la Geskoltoj en la "Reformed Church" Konstruaĵo, kun muziko, deklamoj kaj paroladoj pri la lingvo. Nun en diversaj partoj de la urbo estas almenaŭ ses klasoj por la Skoltoj, kies instruistoj estas F-ino Margaret A. Ma'sch, D-ro A. A. Jones kaj S-roj Harry Test, J. F. Knowlan kaj H. W. Hetzel.

Oni memoras ke, dum la lasta Kongreso de la E.A.N.A., la Asocio formale decidis peti la lokan Societon ke ĝi metu Esperantan standardon al la de multaj vizitita "Betsy Ross House." — la naskejo de la Usona standardo. Plenumante tiun peton la Esperantistoj de Philadelphia kaj la Skoltoj, — knaboj, knabinoj kaj gestroj kunvenis ĉe "Independence Hall," je la 22a Februaro. Kvankam la neamika "veteristo" preferis festi la naskiĝtagon de Washington per peza neĝfalo la samideano ne timigante, kun flagoj flirtantaj, verdaj steloj sur stangetoj kaj kun taŭgaj motoj superkape tenitaj marŝis al la "Standarddomo." Ĉi-tie, la Delegito de la U. E. A. por la urbo S-ro Hetzel prezentis la Esperantan standardon al la Knabinskoltoj, pere de F-ino Anna Mowbray, Skoltestrino, ŝi vice transdonis la emblemon al la "Betsy Ross

House," kies estro, S-ro C. H. Weisgerber ĝin akceptis en bona por-Esperanta, por-Skolta parolado. Malgraŭ la falanta neĝo kelkaj fotografistoj, laŭ antaŭa aranĝo, — eĉ kinematografistoj — "kaptis" bonajn memoraĵojn de la okazo.

PROGRAMO DE LA GRADATA E. S. EL CHICAGO

Sezono 1917-1918

Dimanĉe, Sept. 30a, Malferma publika kunveno, diverslingvaj paroladoj pri utileco de Esperanto.

Dimanĉe, Okt. 7a, Malfermo de kurso por komencantoj (studentoj el 7 diversaj naciecoj).

Dimanĉe, Dec. 30a, Fermo de la kurso por komencantoj.

Dimanĉe, Jan. 6a, Ekzamenoj por la 2a grado.

Sabate, Jan. 19a, solena disdono de atestadoj de graduantoj ĉe komuna vespermanĝo.

Sabate, Jan. 26a, Enkonduko de graduantoj en la 2an gradon.

Sabate, Feb. 2a, Esperantista karnivalo.

Dimanĉe, Feb. 10a, Malfermo de Esperanta lernejo (nur por diplomitoj).

Dimanĉe, Feb. 24a, Malferma publika kunveno kun paroladoj pri Esperanto.

Dimanĉe, Mar. 3a, Komenco de kurso por komencantoj.

Dimanĉe, Majo 12a, Fermo de la Esperanta lernejo (por diplomitoj).

Dimanĉe, Majo 19a, Ekzamenoj por la 3a grado.

Dimanĉe, Majo 26a, Fermo de la kurso por komencantoj.

Dimanĉe, Jun. 2a, Ekzameno por la 2a grado.

Sabate, Jun. 8a, Solena publika disdono de atestadoj al graduantoj el ambaŭ klasoj.

Dimanĉe, Jun. 16a, posttagmeze kaj vespere. Enkonduko de diplomitoj el Esperanta lernejo (por diplomitoj) en la 3a grado.

Sabate, Jun. 22a, Enkonduko de novaj diplomitoj en la 2a grado (el klaso por komencantoj).

La supra, estas kutima jara programo, krom tio ni havas aferojn laŭ

bezono, ekz. je la 23a de Februaro estis aranĝita surpriza amuzado en honoro de nia diligenta laborantino, kiu edziniĝis, F-ino Manjo Kellner, nun S-ino Zid. En aŭtuno ni aranĝis surprizon je kelkaj niaj volontuloj. Nia grupo ne estas granda sed jam nun ni havas 7 diplomitoj en nia armeo, kaj krom unu, ĉiuj estas volontuloj.

GRAVAJ STATDOKUMENTOJ

La Konstitucio de Usono

(Daŭrigo)

Artikolo 2

La Administracia Departemento

Sekcio 1. La administra povo estu donata al la Prezidanto de Usono. Li administru oficon dum kvar jaroj; kaj, kune kun la Vicprezidanto, elektita por la sama periodo, jene:

2. Ĉiu ŝtato difinu, laŭ la maniero de sia parlamenta direkto, nombrojn da elektantoj egalan al la tuta nombro da Senatanoj kaj Rerezentantoj kiujn la ŝtato rajtas havi en Kongreso; sed neniu Senatano aŭ Rerezentanto povu fariĝi elektanto dum li tenas oficon de fido aŭ profito sub Usono.

3. La elektantoj kunvenu en siaj respektivaj ŝtatoj, kaj balotu por du personoj, el kiuj almenaŭ unu ne estu loĝanto de la sama ŝtato kiel la aliaj elektantoj. Oni preparu liston enhavantan la nomojn de la personoj ricevintaj voĉojn, kaj la nombron da voĉoj por ĉiu; ĉi tiun liston ili subskribu kaj certigu, kaj transsendu sigelitan al la loko de la parlamento de Usono, adresatan al la Prezidanto de la Senato, kiu antaŭ la anoj de la Senato kaj Ĉambro de Rerezentantoj, malfermu ĉiom de la atestoj, kaj kalkulu la voĉojn. La persono ricevinta la plej grandan nombron da voĉoj estu Prezidanto, se tia nombro estus plimulto el la tuta nombro da elektantoj aldifinitaj, kaj se okazus ke pli ol unu persono havas tian plimulton, kaj ili havas egalan nombron da voĉoj, en tiu okazo la Ĉambro de Rerezentantoj tuj elektu per baloto unu el ili por esti Prezidanto; kaj se neniu persono havus plimulton, tiuokaze

el la kvin sur la listo havantaj plej granda nombrojn, la dirita Cambro sammaniere elektu Prezidanton. Sed en la elektado de Prezidanto, la voĉoj estu kalkulataj laŭ ŝtatoj, la reprezentantaro de ĉiu ŝtato havanta unu voĉon; kv. rumo por tio konsistu el membro aŭ membroj el du trionoj el ĉia ŝtatoj, kaj plimulto el ĉiuj la ŝtatoj estu necesa por elekto. Ĉiokaze post la elekto de Prezidanto, la persono havanta la plej grandan nombron da voĉoj de la elektantoj estu Vicprezidanto. Sed se okazus ke du aŭ pli havas egalan nombron da voĉoj, la Senato per baloto elektu el ili Vicprezidanton.

4. La Kongreso povas determini la daton por elektado de la elektantoj, kaj ankaŭ la tagon je kiu ili voĉdonos kaj tiu tago estu la sama tra tuta Usono.

5. Neniu persono escepte de naskita civitano aŭ civitano de Usono je la dato de la starigo de ĉi tiu Konstitucio, estu elektelebla al la ofico de Prezidanto; nek estu elektelebla kiu ajn persono ne atinginta la aĝon de tri-

dek kvin jaroj kaj ne jam loĝanta de dekkvar jaroj en Usono.

6. En la o'azo de elsiĝo de la Prezidanto, aŭ de lia morto, rezigno, aŭ nekapablo plenumi la devojn de la supre dirita ofico, la Vicprezidanto anstataŭu lin; kaj la Kongreso havas povon laŭleĝe provizi por la okazo de eksigo, morto, rezigno aŭ nekapablo de kaj la Prezidanto kaj la Vicprezidanto, difinante kiu aŭn oficisto agu kiel Prezidanto; kaj tiu oficisto laŭleĝe agu ĝis kiam la rekapablo estos forigita, aŭ alia Prezidanto elektita.

7. La Prezidanto je difinitaj periodoj ricevu pro sia servado kompencon, kiu estu nek pligrandigita nek malpligrandigita dum la periodo por kiu li estas elektita kaj li ricevu dum tiu periodo nenian alian rekompencan de Usono, aŭ de kiu ajn ŝtato.

8. Antaŭ ol alpreni la devojn de sia ofico, li devas jene juri aŭ promesi: "Mi solene juras ke mi fidele administros la oficon de Prezidanto de Usono; kaj laŭ mia plej bona kapablo konservos, protektos, kaj defendos la Konstitucion de Usono."
(Daŭrigota)

INSEKTOJ EN KOMIKA FOTOGRAFADO

D-ro Lehman Wendell


Cuts Copyright by Lehman Wendell
Used by courtesy of Photo-Era

Multaj ideoj ekzistas pri miaj komikaj insektfotografadoj kaj pri la metodoj kiujn mi uzas por fari ilin. Unuj opinias ke mi uzas zoologiajn specimenojn, aliaj kredas ke mi uzas insektojn speciale instruitajn por mia celo, ankoraŭ aliaj havas la ideon ke mi uzas virojn kaj virinojn vestitajn kiel akridoj.

Ĉiuj opinioj estas eraraj. Estus neeble uzi zoologiajn specimenojn ĉar ili estas tro sekaj kaj rigidaj, kaj al rigida insekto mankas la povo, volo, kaj inklino sin konduti ĝentile antaŭ la kamereto.—ĝi povas nur stari senmove kiel egipta mumio. Rilate al la instruado de insektoj por mia speciala celo, mi povas certigi ke tio estas neeble afero. Mi bone scias ke lertaj homoj povas dresi musojn kaj pulojn ĝis tiuj insektoj fariĝas lertaj gimnastikistoj, sed mi dubas ke iu homo

povas dresi akridon; ĝi estas tro viveca, tro saltema, tro diableca. Pri la uzado de viroj kaj virinoj vestitaj kiel akridoj, tio estas tute ridinda ideo. Se mi montrus min sur la strato kune kun tiaj strangaj eksterlanduloj la policedestro baldaŭ kaptus min je la nuko kaj jetus min en la ŝtatan frenezulejon.

Ne, miaj akridoj estas el la komuna ĝardena speco, nedukita kaj nekulturita en la aferoj de malbona mondo. Mi kaptas ilin laŭbezono, tiam dormigas ilin per kloroformo, post kiam estas facile starigi ilin per kaŝitaj aŭ nevideblaj metalfadenoj. La kloroformon oni devas doni tre zorgeme, preskaŭ tiel zorgeme kiel oni donas kloroformon al pacien'o antaŭ operacio. Se oni donas tro multe da kloroformo la akrido mortas kaj fariĝas ruĝa kiel la vango de jus-kisita fraŭlino, kaj ruĝo malbone fotografigas; se ne sufiĉe de la drogo estas donita, la insekto vekigas ĝuste kiam la fotografisto faras la espozon kaj tiam ĝi palpebrumas kvazaŭ por diri al la fotografisto, "jen mi difektas vian pladon pro via malrespekto." La plej



bona metodo por doni la kloroformon estas jene: oni malsekigu per la drogo peceton da kotono kaj metu ĝin en malgrandan glason tiam oni metu la insekton en la glason kaj kovru ĝin (ne la insekton sed la glason) per peco da vitro. Post du ĝis kvin minutoj la insekto dormas trankvile kaj laŭte ronkas. Jen la psikologia momento, kaj oni devas tuj pozi la besteton kaj premi la butonon de la kamereto.



La antaŭaĵo de la fotografajo konsistas ordinare el speco de musko. Uzi pecon da herbaĵo estus senutile, ĉar herbero estas pli alta ol akrido. Oni devas uzi ion kio similas al herbo sed estas proporcie je insekto.

Por malantaŭaĵo mi uzas kion ajn estas proksima. Blanka papero metita malantaŭ la insektoj aspektas en la fotografajo kiel sennuba ĉielo. Se mi deziras nubojn en la bildo mi anstataŭas la blankan paperon per 10x12-cola fotografajo pligrandigita el nub-

negativo farita por tiu speciala celo. Por nigra malantaŭaĵo ia malhela vestaĵo taŭgas, kondiĉe ke ĝi estu metita sufiĉe malproksimen por ke la fadenoj de la plektaĵo ne estu videblaj. En mia bildo de la astronomo la ĉielo estas nigra pantoŝono pendanta sur seĝo kelke da futoj malantaŭ la insekto. La steloj estas nigraj punktoj faritaj per fontanplumo sur la negativo, kaj kompreneble ili fariĝas blankaj sur la positivo aŭ fotografa papero.

Mi ĉiam pozas kaj fotografas la insektojn interne de mia ĉambro. Estus neeble fari la bildojn ekster la domo, kie la plej kvieta vento estus sufiĉe forta por detrui la tutan arangajon.

Mia kamereto estas el la fokusa aŭ eltirebla speco, kaj la eltirilo estas tiel longa ke estas eble fokusi sur objekton kiu estas malproksime de la kamereto nur kvar colojn. La kamereto ankaŭ estas provizita je vitro en




ia malantaŭ: parto sur kiu mi povas vidi la ĉielon en la bildon.

Por pli bone klarigi miajn metodojn permesu ke mi klarigu detale kelkajn bildojn.

La Astronomo Pri tiu ĉi bildo mi jam parolas. Mi volas nur aldoni ke la teleskopo estas farita el tri pecoj da pajlo, metitaj unu en la alian. La

ringo estas floro. Nu, tiu tutajto estas umbelo. Se mi nun fortiras du fingrojn de via umbelo restos tri, kaj ili formas la tripodon.

La Dando Tiu ĉi sinjoro estas Esperantisto. Pri tio vi dubas, tion mi klare vidas, sed mi persone konas lin kaj li bone pepadas la lingvon. Li kelkfoje forgesas la akuzativon (tio



trip'edo estas farita el umbelo de floro, kies ĉiuj trunketoj estas fortranĉitaj escepte tri. Se la leganto ne estas botanikisto mi devas klarigi ke umbelo estas fas'o da branĉetoj, ĉiu branĉeto portante floron. Vi ankoraŭ ne komprenas! Ho, ĉielo! Via kapo certe estas farita el solida eburo. Aŭskultu nun kaj mi klarigos kvazaŭ vi estus trijara infano. Imagu ke via mano estas vegetaĵo kaj ĉiu fingro estas branĉeto. Sur la pinto de ĉiu

pruvas ke li estas Esperantisto—Red.). Li fumas cigaredon. Li ankaŭ maĉas tabakon. Li estas malbone edukita Esperantisto. Li staras antaŭ tabulo kiu anoncas pri certa multe ŝatata cigaredo. Li pensas ke la tabulo estas farita el granda plata peco da ligno, sed li eraras. Ĝi estas nur malgranda anonco eltranĉita el la ĵurnalo. Mi mem eltranĉis ĝin kaj tiam surgluis ĝin sur du malgrandajn branĉetojn. Sur la anonco oni legas la jenan surskri-

bon: "Every-where. Why? The Turkish Cigarette. Fifteen Cents." Tio estas Anglajo, kaj se vi estas fanatika Esperantisto vi ne komprenas ĝian signifon, eĉ se vi estas Usonano. Permesu do ke mi traduku. Jen la signifo: "Ĉie. Kial? La Turka Cigaredo. Dek-kvin cendojn." Per tiu ĉi surskribo la fabrikistoj volas anonci al

ĉar la fabrikistoj estas grandaj mensoguloj. Post la vorto **kial** oni legas, "La Turka Cigaredo." Sed la cigaredoj neniam vidis Turkujon; la tabako kreskis kaj la cigaredoj fabrikiĝis en Usono. "Dek-kvin cendojn" signifas ke kontraŭ tiu ĉi monsumo vi povos havigi al vi unu skatoleton de la cigaredoj, sed tio estas alta prezo



kredema mondo ke oni povas aĉeti la reklamatajn cigaredojn ĉie, alivorte en ĉiu loko. Se vi do veturos al la neesplorita interno de Afriko vi trovos tiajn cigaredojn, aŭ se vi iros al la norda poluso por pasigi vian desemanan libertempon vi trovos la cigaredon ankaŭ tie. La dua vorto de la anonco estas **kial**, kaj la ideo entenata estas, "kial oni trovas la cigaredon ĉie?" La respondo estas,

ĉar kuracistoj certigas al ni ke ĉia cigaredo estas ĉerk-najlo.

Pensante pri la aserto ke ĉiu cigaredo estas ĉerk-najlo mi sentas min tiel malĝoja ke mi ne plu povas skribi. Se vi do deziras pluajn detalojn pri miaj bildoj vi devas veni al mia oficejo. Mi havas belajn instrumentojn. Unue mi eltiros viajn dentojn, poste mi klarigos miajn bildojn.

SUPER LA MILITO

De Odiorne Gleason

Daŭrigata

Ofte ŝi volis, ke tiu vere estus la princo, ke ŝia amanto kuŝus en la lito ĉe ŝi. Kiel ĝoje ŝi estus lin zorginta, lin fleginta, revenigus al li la sanon, sed ne, tiu feliĉo ne okazus—filo el longa vico de noblaj Iranoj estas de ŝi apartigita por ĉiam, ne sole pro montoj da glacio kaj neĝo, sed aldone pro aliaj montoj de kasto kaj religio, ŝi neniam edziĝus kun musulmano!

Sed ŝi toleris al si la revaĝon, tia imagino ne difektus ŝin kaj ŝi tre ofte sin trovis flotantan, foje kaj ree, al la dolĉaj, lunlumigataj noktoj en antikva Irano, kiam tiu ĉi princo el la reĝa sango tiel freneze ŝin amindumis ĝis tiam kiam ŝi estis devigata forflugi por lin eviti!

Ne difektus al ŝi nun pripensi pri la memorindaj tagoj, kiam ŝi lernigis Zamenhofan lingvon al klaso de Persiaj intelektuloj. Kiel vigle ili serĉis la sciadon kiu malfirmigis al ili la provize'ojn en okcidentaj libroj. Zeroastron, le leĝojn de la Medoj, ili forgesis? Du librojn ŝi perinstruis, la brestomatiko kaj la nova testamento.

Kiam ŝi forflugis ŝi forlasis la librojn ĉe princo Arta'. Ĉu li konservis tiujn librojn, ĉu ne? Ŝi demandis al si. Ĉu li studadis la karan lingvon post ŝia forigo? Ĉu lia amo ekŝanĝis ĝis la malamo? Ĉu li ŝin forgesis pro unu el la ŝpareme vestitaj virinoj en lia patrujo? Ŝi neniam sciuis. Ŝi neniam revidis princon Artabeson. Alvenis tago kiam hirurgiistoj okazigis interkonsiligon. Antaŭe ili estis vizitinta Karlon, kaj vane penis interparoli kun li, ekscii pri lia spirita stato. Al ĉiuj iliaj demandoj li nur skuis la bandaĝitan kapon, li komprenis nenion kvankam la aŭdado evidente estis bona. Ili tute ne komprenis la problemon. Kia komplikajo estas tiu ĉi? La serĝento gvardista kaj liaj kamaradoj ĉiuj vizitis Karlon, sed li ne konis ilin, ne faris ian respondon al iliaj demandoj.

Unuvespere lia fratino ĵus forlasis lin post vana penado lin enlogi en interparoladon, eĉ fari al ŝi signon ke li ŝin konas, kiam alvenis Imoĝeno por ŝin anstataŭi ĉe la lito. Karlo

ŝajnis dormi kaj dum li kuŝis sub malfortaj lumradioj, la malnovaj fantaziaĵoj, la malnovaj memoroj pri princo Artao revenis. Kiun ŝi devus pensi? Ĉu ŝi frenezigus? Pro kia kaŭzo ekrapis sur ŝin tiu ĉi stranga sento? Tiu ĉi ne estas ŝia noblenaskita posteulo de Arbaces! Tiu ĉi estas nur modesta, fidela Karlo, unu el la Svisaj landlimaj gvardistoj. Vere estas, ke li ankaŭ ŝin amas, eble tiel multe kiel la alia, sed nenia alimaniere oni rimarkus similecon. Artabes portis nigrajn harojn, brunajn okulojn, lia haŭto estis malhela; Karlo posedis blondan haŭton, blujajn okulojn, kaj harojn riĉe ruĝbrunajn simile al lia fratino.

Pro kio tiu ĉi fantaziaĵo persistas? Ŝi demandos al la frato Noblo, pri tio, tuj post lia reveno. Arta' unufoje rakontis al ŝi pri stranga, mistera kredo kiu trompis lian Medean spiritojn rilate al transmigrado de spiritoj. Lia mahometana kredo malordinare intermiksiĝis inter multaj antikvaj religioj kaj tradicioj el la Elburz', kaj li kredis, ke ĉiu vivo alvenas al la tero en malmultegaj, disigitaj miriamikroj da energio, devenante de ia loko inter la stelaroj. Li pretendis, ke vivo en arbo, en besto, en kreskajo, en ĉiuj organismoj, estas identa. Ke ĝi nur ŝanĝas kiam ĝia provizora, nedaŭra, enfaldanta, materiala korpo diversiĝas. Ke kiam vivanta organismo ĉesis ekzisti la viva esenco nur simple eliras el sia malliberejo kaj rekuniĝas kun siaj kunuloj en la vasteco de universala vivado. Ke neniu individua fajreto memoris pri sia estinta vivo: ke ĝi povus transigi de unu organismo al aliaj sen ia memoro pro tio ke la organo de la memoro, la enskribajo, la cerbo mem, estas detruita per tiu kiun oni nomas la morto. Li kredis, ke li, unufoje en la malhela pasinto, vivadis kiel rapidega, Arabia ĉevalo, kaj li esperis revivigadi kiel unu el tiuj belegaj, inteligentaj ĉevaloj kiujn li tiel multe amis.

Imoĝeno finigis la kurson kiun ŝi instruis la klason, en kiu Artao tiel fervore studadis, per penega studado pri la mireginda preĝo Zamenhofa, "Sub la Verda Standardo." Duonkonscie ŝi nun ekripetis la inspiritajn vortojn de l'Majstro, "Al Vi, ho potenca, senkorpa mistero, Fortego, la mondon reganta, Al Vi, granda fon-

to de l'amo kaj vero kaj fonto de vivo konstanta. Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas, sed ĉiuj egale en koro Vin sentas. Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu regas, hodiaŭ ni preĝas. Al Vi ni ne venas kun kredo racia, kun dogmoj de blinda fervoro: Silentas nun ĉiu disput' religia kaj regas nur kredo de koro. Kun ĝi kiu estas ĉe ĉiuj egala, kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala, ni staras nun, filoj de l' tuta homaro ĉe Via altaro. Homaron Vi kreis perfekte kaj bele, sed ĝi sin dividis batala: popolo popolon atakas kruele, frat' fraton atakas ŝakale. Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera, aŭskultu la voĉon de l'preĝo sincera, redonu la pacon al la infanaro de l' granda homaro!" Kiel veraj, inspiritaj, la vortoj en la preĝo estas! Kiel mirige li estis antaŭvidinta la nunan, teruregan katastrofon! Plue—"Ni juris laberi, ni juris batali, por reunuigi la homaron. Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali, sed lasu nin venki la baron; donacu Vi benon al nia laboro, donacu Vi forton al nia fervoro, ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj nin tenu kuraĝaj."—Kaj la espero, la promeso—"La verdan standardon tre alte ni tenos; ĝi signas la bonon kaj belon la Forto mistera de l'mondo nin benos, kaj nian atingos ni celon. Ni inter popoloj la murojn detruos, kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero ekregos sur tero." Ĉu tia feliĉega, triumfa tago iam alvenos? Imoĝeno demandis al si. Kiel nigraj, kiel senesperigaj la mallevigantaj militnuboj super tuta Eŭropo nun ŝajnis. Franclando, "La Belle France," tiun kiun ŝi tiel multe amis, sangellasis per milionoj da vundoj; la sango el ŝiaj plej bonaj kaj plej noblaj trempis milionojn da batalkampoj, ŝiaj maljunaj restis malsataj kaj senhejmaj en la aŭtuno de la vivo; ŝiaj filinoj estis vidvinitaj, orfgitaj, il'aj gefratoj kaj amantoj forŝtelitaj kaj mortigitaj sovaĝe kaj kruele; ŝiaj preĝejoj kaj sanktejoj malsanktigitaj, sed tamen, tra ĉiuj kaj super ĉiuj ekflamis tiu mireginda kuraĝo kiu ebligis ke la popoloj sin elporti kontraŭ ĝi senmurmure, eĉ kvankam il'i bone sciis, ke la fino nur alportos al ili citon en "Le livre d'or des esperantistes Français," "Mort pour la France!"

(Daŭrigota)

OUR TEN CENT COUNTER

(With Apologies to Cottonworth)

We find the following books on hand in too small quantities to include in our regular Book List, and will close them out at

TEN CENTS EACH

Some of these have sold as high as fifty cents.

Of many there are only one or two on hand when this list is published, so in ordering be sure to name second and third choice. We cannot afford to carry on correspondence in regard to these—If we have not the ones to fill your order we reserve the right to substitute.

Ama Bileto, Artefarita "Altmontarsun" Bano, La Antaŭdoro, La Amkonkurantoj, Aladino kaj Palomido, Bombasto Furiizo, Consilium Facultatis, Du Maljunuloj, Du Biletoj, Dum Kongreso, Encido—Kantoj I kaj II, Ekzerkaro, Evangelio laŭ Sankta Johano, El Dramoj, Fabeloj de Andersen, Granda Monato de Esperanto, Homa Doloro, La Hipotezoj pri Lourdes, Improvizacio de Konrad, La Instituto Milner, La Instruita Mimikisto, Katerino, Kio povas okazi se oni donacas surprize, La Kolorigisto-Aerveturanto, Kverko kaj Floro, Klarigo pri Unitaria Kristanismo, Konsiloj pri Higieno, Kasitaj Vortoj de Baha' U' llah, (El la Persa), Komercaj Leteroj, Resumo de la Kurso pri Teologio, Kion la Vivo Alportas, La Morto de Ivano Ilijĉ, Matematika Terminaro, Muzika Terminaro, Naŭ Historioj pri l' Aŭtoritato, Plena Verkaro de Devjatnin: Libroj Unua, Dua, Tria, ka Kvara, Portreto, Pri Solidareco inter Esperantistoj, Parizina, Petaloj, Pri Unu Speco de Kurbaj Linioj, Reaperantoj, Rememoro pri Solferino, Sinjoro Herkules, La Stopististo, Solecraj Animoj, Sieĝo de Sebastopolo, Superforta Ambicio, Tekstaro de Bonkonataj Britaj Kantoj, Unuaj Agordoj, Unua Ŝtupo, La Vangfrapo, La Vizio de la Poeto, La Vojo de l' Vivo, Versfarado kaj Rimaro, Venĝo Venĝita.

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, Inc.
West Newton - - Massachusetts

DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje: 50 sd. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

S-ro Agustin S. Vidal, Mondoza 3437, Rosario, Santa Fe, Argentina. 1

S-ro C. Morice, Sontay, Tonkin, Indo-China. I. P., P. M. 1

S-ro Arthur Daem, Hop. mil Belge, lup. Per-rat, Francujo. 9

Angel J. Mazzucconi, Strato Cochahambra 983, Buenos Aires, Rep. Argentina. (IPK.) 9

Johano E. Barquin, Strato Castelli 123, Bahia Blanca, Rep. Argentina. (IPK.) 9

G. J. Degenkamp, Bethlehemweg 36, Utrecht, Nederlando. 2

S-ro Maeschalk, Eugene, 3e batterie de siege Camp de Harderwijk, Hollande, bloc 5. 1

S-ro John K. Miliauskas, 456 Grand Street, Brooklyn, N. Y., Usono. 1

S-ro Maurice Mazonaud, Perigneux, 22 rue Louis Blanc, France, P., I.K. Ciam re pondo. 4

REMEMBER

That we take subscriptions for any periodical in the United States or Canada.

If you have not received our price list — send for it.

The American Esperantist Co.

Incorporated

West Newton - - Massachusetts

HAVE YOU HEARD

OF THE

Llano Co-operative Colony?

This is the largest co-operative colony in the world and the most complete form of co-operative. *The Llano del Rio Colony*, at Llano, Los Angeles County, California, has just purchased a 16,000 acre tract in Louisiana. It bought an entire town with the land. Within six months 1000 persons will be living there.

The WESTERN COMRADE

Tells each month of what these co-operators are doing. Send for a free sample copy and learn what is being done where all men are paid an equal wage, where private profits have been abolished, and where there is neither rent nor interest paid by individuals.

Llano Western Comrade
Stables, Louisiana

(Formerly of Llano, California.)

**The
Public**

An International Journal
of
Fundamental Democracy

A clever man said that when people speak of "habits" they refer to bad habits only. As a matter of fact habits are both good and bad. Personal progress is largely a matter of good habits. Reading "The Public" is a habit which thousands of alert minds practice. Why not cultivate this invigorating habit yourself?

References: Lincoln Steffens, Brand Whitlock, Judge Ben B. Lindsay, Ray Stannard Baker, and you—after you have tried it.

Introductory Offer: Three booklets on the Singletax and 10 issues of "The Public" only 25c.

The Public
122 East 37th Street N. Y. City